

MARIE MAJEROVÁ

PRAHA

La mezepoko ne revis pri la hodiaŭaj milionopaj urboj nek la iamaj prahanoj pripensis, ke estonte en iliaj stratetoj svarmos tiom da veturiloj. Ili ja konstruadis nur por sia dumtaga negocado. Nokte la gardisto per halebardo haltigis ĉiun, kiu ŝteliris sen lanterno. Tiamaj patricioj pensis nur pri propra sekureco kaj malmulte da spaco estis inter la urbaj muregoj.

Ni heredis tion, kion dum epokoj la arkitektoj-artistoj kaj ŝtonhakistoj enkorpigis en ŝtonblokojn. Per la pri-laboritaj granito aŭ sabloŝtono ĉiu epoko eternigis sian atmosferon, sian poezion kaj belsenton. Kaj ni hodiaŭ ŝatas tiun ĉi perfekte vivan kompilaĵon da stiloj, kiuj kvazaŭ ludkreis sinsekvaj epokoj. Plaĉas al ni la pitoreskaj portaloj kun ursetoj, pesiloj kaj rozoj. Plezure ni rigardas angulojn kun herberoj aŭ flankesituita pavimo. Ravas nin foliaro de balkonaj balustradoj el fero batformitaj. Ni amas la refrakton de ombro kaj de mallumo en seneliraj stratetoj, kie la luno malkaŝigas kisantajn amantojn.

Sed al malnova Praha - belulino ni estas logataj ankaŭ per imagipovo de fantazio, saturita de la historio. Super la arkado de ŝtona ponto ni kutimas revi pri sangversaj batalrenkontoj pro kredokonfeso de la ekkonita vero. Tra gracilaj fenestroj de la Betlehem-kapelo revigliĝas nia memoro per la voĉo de magistro Jan Hus. Montopinto Vítkov vivigas en ni gloron de husanaj armeoj. La Malnovurba placo! Kiu povas hodiaŭ trairi ĝin sen ŝokanta teruro de fantomoj: ĉi tie tumultiĝis ribelanta malriĉularo, ĉi tie ruĝe sangis la ekzekutejoj de noblaj civitanoj. Kaj la Pulva turo povus nomiĝi la Paca memore al paciga penado de ĉeĥa reĝo Georgo el Poděbrady. El araneaĵo de stratetoj superflugas nia ravita rigardo al la turpintoj, are amasigitaj finialoj, kupoloj kaj kupoletoj, portantaj la firmamenton apenaŭ supozantan en ambaŭflanka frontonombro de altaj domoj.

Sed hodiaŭ ja ekzistas, ekzakte dirite, du Praha — urboj: la riĉornama Malnova, la koro de Praha, kaj la nova Granda Praha.

La Nova Praha antaŭ niaj Okuloj kreskas el betonaj fundamentoj, el brikmuroj, kaj la novigemaj konstruistoj rapidigas ĝian kreskon senĉese por pli bonaj metodoj. La oferemaj manoj de bonvolontuloj rearanĝas la lokojn neglektitajn dum Hitler-invado. La lertaj manoj de ĝardenistoj, sen vivajn vojkruciĝojn ŝanĝiĝas en agrablajn parkojn. Tiel en ĉarmeco disvolvigas la ebenaĵo de I.etná, kiu aerumas la urbon kaj malvualas la firmamenton en ĝia giganta vulvaĵo kun sunmigrado tage kaj kun stelaro nokte.

La Nova Praha! Kian aspekton ĝi montros al niaj posteuloj? La socialistoj antaŭvidante pluajn milionojn da posteuloj grandspacie mezuras estontajn stratojn de Praha. Novaj placoj vasten malfermas brakojn al homamasoj. La ĝardenoj de malnovaj palacoj, dum jarcentoj ŝlosfermitaj, hodiaŭ alirebliĝas per infanoj. La prahano ricevis vastampleksan parkon de kulturo kaj ripozo zorganta pri kontentigo de

/Daŭrigo sur 1a. kvara paĝo/

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 1 Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.

### DUONJARA RAPORTO PRI AGADO DE EKP

Pasis jam duonjaro de la jaro 1960 kaj ni devas iom rerigardi, kia estis nia laboro. Juĝu mem! Ĉar nun mi volas montri al vi nian duonjaran laboron. Jen estas la konciza programo:

Ĉiumerkrede okazis prelegoj el diversaj fakoj, dum kiuj alternis ankaŭ multaj parolintoj, gesamideanoj: Vítek - "Nuntempa Gronlando", Hebký - "Travivaĵoj en Siberio"/du prelegoj/, Kynčl - "Kiel kulturi florojn en niaj hejmoj kaj ni fondu ĝardenojn inter domblokoj", Zedníková - "Libroj, bibliotekoj kaj legantoj" kaj "Evoluo de homa laboro", Slanina-Rybínski - "Vespero de satiro kaj humoro", Podmele - "Mi vizitis Egiption"/kun lumbildoj/, Pumpr - "Kompleksaj verkoformoj en la lumo de renovigita diskuto", Josková „Renkonto pri Hungario" /esp. renkontiĝo en Miskolc/, Hromada - "Babilado ĉirkaŭ vortaroj", Ondráček - "Praha kaj ĝiaj legendoj" /du prelegoj/. japana s-ano Kel Kurisu - "Mia esp. vivo".

Ni neforgesis ankaŭ gravajn ĉeĥoslovakajn kaj internaciajn datrevenojn, kiujn ni rememoris per apartaj programoj. Komence de la jaro ni rememoris la naskiĝtagon de nia ĉeĥa poeto Jiří Wolker /s-ino Seemannová/, En marto estis preparita programo okaze de la Internacia tago de virinoj/samideanino Seemannová/. En aprilo okazis parolado okaze de la naskiĝdatreveno de V. I. Lenin /s-ino-Zedníková/. Okaze de la liberigo de Ĉeĥoslovaka respubliko estis preparita parolado "Pri la sukcesoj, kiujn ni atingis dum dekkvin jaroj"/s-ino Míčová/. Ankaŭ al la Internacia tago de infanoj ni preparis paroladon /s-ino Siháčková/.

Samtempe ĉiumerkrede s-ano Rybínski prilaboris "Vivantan gazeton" -informojn el la tuta mondo. Krom tiuj ĉi regulaj ĉiumerkredaj kunvenoj ni ankoraŭ en angla: La 14-an de februaro - paroladon de s-ano Eizo Ito - "Pri Japanujo". La 24-an de aprilo, laŭ peto de gesamideanoj el Marseille, speciale de la esperantista rondeto "Mistralanoj", okazis en Praha rememora soleno ĉe tombo de Sigismund Bouška. Tradukisto de la fama poemo de Mistral - "Mirejo". La 30-an de aprilo okazis inaŭguro de nia kluba esp. bibliotekejo en Týnská strato.

Ni havis ankaŭ eblecon akcepti inter ni kelkajn gastojn el eksterlando, inter kiuj estis ges-anoj: Kei Kurisu, kiu eble restos en Ĉeĥoslovakio tutan jaron, la 13-an de februaro alveturis s-ano Eizo Ito el Kameoka. La 12-an de marto estis inter ni profesoro E. A. Bokarev el Moskvo, la 2-an de aprilo - geedzoj Farkas el Szeged, la 7-an de febr.- Lidja Suetova el Moskvo, la 20-an de febr. - d-ro J.Avalos Pérez el Meksikio, la 8-an de majo - Nils Olsson el Svedujo, la 14-an de majo - Zoja Skvorcova el Kujbiŝev kaj 28-an de majo- Margarita Filipova kaj Maria Mihailova el Sofio.

-ek

### VIETNAMA AMBASADORO INTER NI

Granda antaŭĝojo de s-anoj de EKP, kiuj flue de junio ricevis bildkartojn de k-do N.V. Kinh, vjetnama amba- sadoro en Moskvo, Budapeŝto kaj Tirano sciigitajn pri lia deziro renkontiĝi kun samideanoj en Praha, realigis la 14-an de Julio vespere en la luksa kafejo "Filmový klub".

Partoprenis nur membroj atingeblaj per telefono. La estimata gasto surprizis per sia ĉarme arnika personeco, dank' al kio oni dum kelkaj minutoj preskaŭ forgesis, ke li ne estas membro de EKP, sed ano de la diplomata korpuso de Vietnamia popola respubliko, en ties plej grava funkcio. Du disponeblaj horoj ne sufiĉis por pridis- kuti problemojn kaj perspektivojn de kunlaborado de socialismaj ŝtatoj sur kampo de kulturo kaj specialan Signifon de Internacia Lingvo por reciproka kultura interarango inter eŭropaj kaj aziaj nacioj. Oni interkonsentis, ke Esperanto estas natura lingvo de paco kaj laŭ vietnamaj spertoj, ekz. en eldonagado, valora ilo de porpaca batalo kaj propagando de socialismo ankaŭ en rondoj per alia vojo neatingeblaj.

Bedaŭrinde la ŝatata gasto traveturis nur nian urbon. Tamen la interparolo, kvankam mallonga, estas granda okazintaĵo, ĉar ĝi inaŭguris vastan kunlaboradon, kies fruktojn baldaŭ ĝuos esperanistoj de niaj landoj..

Kaj EKP ĝoje atendas, ke baldaŭ realigos nova, pli longa renkontigo kun k-do ambasadoro Kinh, bonega esperantisto kaj nia ŝatata arniko.

-jmh

DANK' AL VIA HELPO ..

En duono de la pasinta jaro forveturis al Japanujo s-ano Eizo Itoo, por viziti kelkajn landojn kaj fari tie prelegojn pri sia lando. Lia plano pligrandigis kaj la vojaĝo daŭris la tutan jaron. Inter la landoj, kiujn li vizitis estis ankaŭ Ĉeĥoslovakio, kie li kelkfoje prelegis. Kiam li revenis hejmen, li tuj sendis al ni jenan multobligitan leteron:

Kameoka, la 5-an de julio 1960 Tre estimata samideano!

Fine mi revenis hejmen antaŭhieraaŭ, la 3-an de julio, post preskaŭ unujara vojaĝo en Eŭropo kaj Norda Ameriko. Nun antaŭ ĉio ni rapidas sendi al vi mian elkoran dankon pro la afableco kaj helpemo, kiun vi tiel senrezerve montris al mi okaze de mia vizito.

Kiel feliĉa mi estis ĉiutage en la daŭro de la tuta vojaĝo! Kiel bonkoraj por mi estis la esperantistoj en plej diversaj landoj! Diferenco de koloro, religio aŭ reĝimo tuto ne malhelpis, ke mi inter esperantistoj ĉiam sentis min hejme, eĉ pli ol hejme! Nun en miaj fermitaj okuloj mi vidas unu post la alia la karajn gesamideanojn, kun kiuj mi konatiĝis en la ĵus vizititaj 150 urboj de 22 landoj. Jes, ĵus - ĉar eĉ la plej frue vizititaj restas en mia memoro tiel freŝe, kiel hieraaŭ.

Dank'al via helpo mi vidis kaj lernis multon. Dank'al la kunlaboro de la samideanoj mi povis eĉ fari multon. Certe, 180 prelegoj, el kiuj 90 estis tradukitaj entute en 14 nacilingvojn estas ja pli ol mi povis esperi.

Esperanto montris al mi mirindan taŭgecon, ĝiaj adeptoj mirindan solidarecon. Mi sentis per mia tuta korpo, ke Esperantujo fartas bone, vivas vigle kaj ke la movado faras potencon progreson ĝenerale, eĉ se en kelkaj lokoj la stato momente montrigas ne tiel bona. Esperanto venkos nepre, pli malpli frue, kaj tio dependas sole de nia energia kaj solidara laboro. Esperanto venkas jam nun, kaj la venkon pligrandigos, certigos, definitivigos ja ni mem.

Baldaŭ en aŭgusto, okaze de la japana Esperanto-Kongreso ni decidis la inviton de U.K. Ni faros nian plej eb- lon por sukcesigi la epokfaran eventon - unufoje U.K. en la Oriento, kiu tre verŝajne okazos en la jaro 1963. Do, kara samideano, daŭrové elkorajn dankojn kaj ĝis revido sub la monto Huji! Sincere via Eizo Itoo.

### ĜOJPLENA RENKONTIĜO KUN PACDEFENDANTOJ

Kelkaj membroj de nia Klubo vizitis vespere 22.7. 1960 la esperantistajn membrojn de nederlanda karavano, kiu revenante post dusemajna restado en ĈSSR haltis en Praha. Montrigis, ke temas pri granda grupo de nederlandaj pacdefendantoj kaj inter la esperantistoj ni rekonis ankaŭ malnovajn konatojn, la geedzoj Cor de Waart, konatiĝis kun juna s-ano Ros k. a. Kune ni partoprenis adiaŭan vesperon, aranĝitan de la Ĉeĥosl. Komitato de Pacdefendantoj. En la salono de la malnova, bela Kounic - palaco /Panská strato/, sidejo de la Komitato disvolviĝis atmosfero de sincera internacia amikeco kaj de ĝoja, fine tre gaja humoro. Oficialajn alparolojn de ambaŭ flankoj kaj interŝanĝon de donacoj sekvis muziko, dancoj kaj kantoj ĉarme prezentitaj de folkloro studenta kolektivo "Strážnice". Post regalo kulminis intime amika amuziĝo al kiu kontribuis ambaŭ flankoj per kantado kaj popolaj dancoj. Sincera ĝojo radiis de ĉies vizaĝo. Ni ŝate rememoris la renkontiĝon de nederlandaj kaj ĉeĥoslovakaj pacdefendantoj. -JM

### BONA SUKCESO EN SET

Dum la planita Kolegio de Esperanto en Znojmo ne okazis pro nesufiĉa nombro de aliĝintoj /30/, la Somera Esperanto-Tendaro. /SET/ apud Lančov sur la bordo de Vranov-lago /17.7-13.8./ ne povis akcepti ĉiujn aliĝintojn. Ni ne povas pritaksi la tutan aranĝon, ĉar SET ankoraŭ daŭras dum la redakto de tiu ĉi informo. Ni raportas pri la finiĝinta 1-a etapo. En tiu etapo /17. ĝis 31. 7./ kunvenis bonega kolektivo de 64 homoj plejparte junaj, kiu montris surprizan studemon kaj sciemon, inter ili kelkaj hungaroj, unu polino /Gdynia/kaj unu grekino. Granda parto venis el Slovakio, inter ili s- anino Smrekavá, edzino de populara slovak poeto. Instruis geedzoj Novobilský, E. Geleta, O. Kníchal, Z. Rusín kaj C. Závodný en 5 kursoj /A, 2B, C, D/. Krom la gramatiko oni instruis la literaturon kaj historion de Esperanto. Espereble la dua etapo kun novaj pli ol 60 partoprenantoj estos same sukcese. Ni povos vidi SET en koloraj diapositivoj kaj en amatora filmo.

/Van kaj JM/

## ESPERANTO EN "ASOCIO DE ĈEĤOSLOVAKAJ VERKISTOJ"



Nia japana arniko s-ano Kai Kuriau, el Tokio, kiu nuntempe instruas japanan lingvon en nia universitato, vizi- tis la 26-an de julio 1960, kiel oficiala delegito de Asocio de progresantaj japanaj verkistoj "Nova literaturo" la sekretariejon de Asocio de ĉeĥoslovakaj verkistoj en Praha, por transdoni librojn, donacojn de japanaj verkistoj al niaj verkistoj. En la nomo de la AĈV akceptis la estimatan gaston vicsekretario k-ado Ptáčník. Krome ĉeestis k-ino Stříbrná kaj k-oj Sychra kaj Havlík. Oni interparolis helpe de Esperanto kaj verkisto k-ado Ptáčník esprimis sian estimon rilate al kultura valoro de Internacia Lingvo. S-ano Kurisu, kiu tradukis japanen kaj eldonis multajn ĉeĥajn literaturaĵojn/inter ili la "Avineto" jam trifoje/, povas nun kalkuli kun efika helpo de Asocio de ĉeĥoslovakaj verkistoj. -jmh

/Daŭrigo el la unua paĝo./

kulturaj postuloj kaj ĝojigo por infanoj samkiel por maturaj homoj. Meze de urbo sur insuloj de rivero Vltava kaj sur ĝiaj bordoj oni trovas abundon da refreŝiĝo en naĝlokoj kaj sur ŝipetoj. Novaj tuneloj kaj pontoj liberigas spacon por piedirantoj. Kaj la kajoj kun neforgeseblaj rigardoj al kastelo Hradčany estos plilongigataj pog ĝojo de la ŝatantoj de promenado, laŭlonge de la rivero.

La Nová Praha! Ĉu Ĉeĥoslovakoj amas ĝin tiel, kiel ni amas ĝin, la nian, kie ni kreskis kaj laboris. Tiuj, kiuj kreskas kaj kreskos en vastaj novaj loĝkvartaloj sur Blankmonta ebenaĵo, sur malabrupte ascendenta elirŝoseo de Dejvice, flanke de kamparaj konstruaĵoj de Kobylisy, sur monteto de Pankrác, ĉirkaŭ la stadiono de Vršovice kaj en ravino inter Břevnov kaj Střešovice: tien inter novajn domojn ni alportos el ĉeĥaj arbaroj altkreskintajn acerojn kaj tiliojn, plantos robiniojn, kratagojn kaj kaŝtanujojn, semos herbon sur liberaj areoj. La nova arkitekturo interligiĝos kun la naturo. Ni kredas, ke la nova Praha estos amata ankaŭ en sia nova bildo.

La Malnova Praha estas bela per nia amo.

La Nova Praha estas bela per nia sopiro.

Tradukis J. Cíhová

### ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKA PRESO

Ĉiuj artikoloj aŭ mencioj pri esp, en ĉeĥoslovaka preso estas daŭre kolektataj. Nia Klubo posedas jam grandan kolekton de tiaj artikoloj, kiuj aperis dum lastaj kvin jaroj.

Tamen oni tute ne povas certigi, ke tiu kolekto estas kompleta. Ni bezonas aktivaj kunlaboron de ĉiuj gesamideanoj!

Pro tio ni petas, sendadu ĉiun priesperantan materialon al la adreso de nia kunlaboranto - s-ano Josef FORMAN Madridská 2, Praha-Vršovice, kiu prilaboros ĝin.

Ekzemple dum la pasinta jaro 1959 ni ricevis 44 artikolojn kaj menciojn pri Esperanto el 20 diversaj gazetoj. El tiu nombro 8 artikoloj traktis pri d-ro L.L.Zamenhof. -ek

### TENDARA KANTARETO

La Esperanto-rondeto ĉe uzina klubo en Poruba eldonis Esperantan kantareton, kiu enhavas 54 kantojn kun mu- ziknotoj. Ĝi estas bona helpilo por interesigi viajn kunvenojn, aŭ konvena donaco por via eksterlanda korespondanto. Bele bindigita koston ne pli ol 5,- Kčs. Vi povas mendi ĝin ĉe Vl. Kočvara, Kamenec 251/3, Ostrava VXXX. -ek

## RENKONTIĜO SUR NEĜA MONTO

En antaŭlasta semajno de junio oni aranĝis renkontiĝon de ĉeĥoslovakaj kaj polaj geesperantistoj sur la plej alta monto de Bohemio kaj Pollando. De la ĉeĥa flanko partoprenis gesamideanoj ĉefe el Kolín /uzina klubo/ kaj pri iliaj impresoj raportas ampleksa artikolo en n-ro 27 de semajna gazeto "Kolínský tatrovák", kiu regule aper- igas sciigojn pri laboro de la vigla klubo. -jmh

## DU TAGOJ EN SAMOPŜE

La 3-an kaj la 4-an de septembro okazis amika renkontiĝo de esperantistoj en rekrea kabano de uzina klubo "Tatra-Kolín" en Samopŝe apud Sázava. Partoprenis ĉirkaŭ 96 esperantistoj el diversaj lokoj, inter kiuj estis ankaŭ s-ano Kei Kurisu - Tokio.

## EL HEROLDO N-ro 9 - 1.6.1960

Dek esperantistoj-arkitektoj al 10 landoj kune prilaboris serion de artikoloj publikigitaj en populara slovena semajna gazeto "Tedenska Tribuna" la 20-an de aprilo 1960 sub titolo: "Moderna arkitekturo, laŭ esperantlingva enketo farita de redakcio". La redaktoro de la kultura rubriko de la nomita gazeto estas Boris Grabnar.

LA 45-a UNIVERSALA KONGRESO okazis de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto en Bguselo. La Kongreson partoprenis ĉirkaŭ 2000 esperantistoj el 40 landoj. En la Belarta Konkurso -poezia branĉo - gajnis la unuan premion nia s-ano Jiří Kořínek el Brno /"Romanco F-majora de Beethoven"/ kaj la duan premion gajnis samideano d-ro L. Izák el Martin /"Al Altaj Tatroj"/. La 46-a UK okazos en jaro 1961 en Harrogate-Londono, Britujo.

## Revuo ESPERANTO N-ro 655/6/1960

En tiu ĉi numero estas publikita poemo de J.Staněk, kiu ricevis la 3-an premion de Belarta konkurso 1959 -"Ĉo San, malgranda japana pupeto".

En la sama numero estas tre interesa artikolo de Einar Dahl La Eŭropa epoko de Esperanto finiĝis". Kelke da perceptoj el ĝi:

Kiam la potenca Homa imperio fine pereis, el ĝiaj ruinoj ekaperis novaj memstaraj statoj: Britujo, Francujo, la germanaj ŝtatoj kaj aliaj. Hodiaŭ ni povas konstati, ke pro similaj kaŭzoj formiĝis Hindujo, Pakistano, Isra- elo, Koreo, Vietnamo, Ganao ktp. Tiu procedo ankoraŭ ne finiĝis. Certe ni iom post iom povos noti la fondiĝon de pliaj statoj, kies loĝantoj deziras vidi sian propran senjungan vivon... Ni Esperantistoj ne estas persone po- litike neŭtralaj, ĉar ni havas niajn politikajn opiniojn kaj idealojn ni subtenas ofte kontraŭajn ideologiojn, sed kiel esperantistoj ni devas neŭtrale plani kaj provi, komune trovi la elementajn kondiĉojn pro disvastigo de nia lingvo en la interpopola kunagado. Kaj nun ni revenas al tio, kion ni pritraktis ĉi supre rilate al novaj ŝtatoj, kiuj avide kaj sencere monie volas havi bonan lokon inter malnovaj ŝtatoj. Ni, esperantistoj, devas atente aŭskulti la voĉojn de la popolo, ni, observu la pensojn kaj sentojn. Ni registru tion, kio sinmovas ĉe la simplaj civitanoj. Tiuj novaj ŝtatoj havas malsimilajn lingvojn - ofte multajn, kaj iliaj situacioj estas tre malsamaj – sed ĉiuj deziras vivi - kaj vivi hodiaŭ signifas laboron.

Kunlaboro estas ebla nur baze de reciproka interkompreno... Ni devas agi nun. Ni devas hodiaŭ provi la vojojn kaj metodojn, kiuj kapablas vekti la intereson pri Esperanto ĉe tiuj popoloj kaj nacioj, kiuj serĉas siajn vojojn al la estontecon...

Oriento estas Oriento kaj Okcidento estas Okcidento - tiuj du neniam renkontiĝas, estas tezo formulita de Kip- ling kaj ĝis nun fakte estis tiel, ke la eŭropa hegemonio kreis abismon inter la du. /Substreki de recenzinto./ Hodiaŭ tiu frazo estas absolute malmoderna kaj neniel ĝi korespondas kun la situacio, en kiu la homaro sin trovas. Pere de Esperanto ni povas doni al Oriento kaj Okcidento facile uzablajn instrumentojn, kiu proksimigas ilin unu al la alia.

/Tre interesa voĉo, se ni konkludas, ke ĝi devenas de Okcidento./

Plua interesaĵo rilatas al laboro de komisiono por ordigo de geografiaj nomoj. Tiun komisionon gvidas kamarado Tibor Sekelj, kiu antaŭ nelonge revenis post sia vojaĝo tra afrikaj ŝtatoj, kie li praktike helpis intarkonati anojn de la Okcidento kaj Oriento.

AŬSKULTU RADIOELSENDOJN

| Lando  | Tago  | Horoj  | Ondo  |
|--|---|--|---|
| AŬSTRIO<br>Wien  | mardo   | 17.40-17.50  | 11; 16; 25; 30; 41; 48;<br>293; 513   |
| BRAZILIO<br>Juiz de Fora<br>Natal<br>Piraçununga<br>Rio de Janeiro | lundo<br>dimanĉo<br>dimanĉo<br>ĉiutage<br>lundo<br>merkredo<br>vendredo<br>sabato<br>sabato<br>vendredo | 1.45- 2.00<br>11.50-12.00<br>15.00-15.15<br>10.00-10.30<br>10.00-10.30<br>19.30-20.00<br>22.00-22.20<br>0.30- 1.00 | 60,91<br>60,79; 236<br>198<br>30,78; 25,48<br>61,50; 88,50; 318<br>25,10; 375<br>214<br>62,83 |
| São Paulo  |   |  |   |
| BULGARIO<br>Sofia  | dimanĉo<br>dimanĉo  | 20.00-20.25<br>23.30-23.55   | 39,11; 41,35<br>30,93; 39,11; 41,35   |
| FRANCUJO<br>Paris  | ĵaŭdo   | 9.30- 9.40   | 235; 280  |
| GUATEMALO<br>Guatemala   | ĵaŭdo   | 0.00- 0.15   | 30,98; 48,54; 470   |
| ITALUJO<br>Roma  | mardo<br>merkredo<br>vendredo   | 18.55-19.10  | 30,90; 41,24; 50,34   |
| JUGOSLAVIO<br>Zagreb   | vendredo  | 0.05- 0.20   | 264   |
| KOREO<br>Pjengjang   | merkredo  | 12.00-12.30  | 48; 278; 365  |
| NEDERLANDO<br>Hilversum  | ĉiunonate la<br>unuan lundon<br>vendredo  | 23.40-23.55<br>23.00-23.10   | 402<br>298  |
| POLILANDO<br>Warszawa  | ĉiutage   | 16.30-17.00  | 25,39; 30,69; 31,50;<br>42,01; 50,42; 249   |
| SVEDUJO<br>Stockholm   | ĉiunonate la<br>lastan marĉon   | 20.00-20.15  | 20,20; 26,10; 32,30   |
| SVISLANDO<br>Bern  | lundo<br>vendredo<br>mardo<br>ĵaŭdo   | 18.30-18.35<br>12.55-13.00   | 13,94; 31,46; 49,66   |
| VENEZUELO<br>Caracas   | mardo   | 3.00- 3.30   | 48,62; 475  |

Pere de aŭskultado vi ekscios novaĵojn el la esp. movado. Ne forgesu, ankaŭ skribi al la radiostacioj, kiuj elsendas en Esperanto, viajn opiniojn kaj dezirojn. - Anoncita horo estas en mezeŭropa tempo.

## MORTIS FRANTIŠEK OMELKA

La 23-an de junio mortis en Otrokovice, meze de sia amata familio, nia bone konata s-ano František Omelka.



Li naskiĝis en Staré Město-Uherské Hradiště la 19-an de aŭgusto 1904. Li fariĝis instruisto kaj estis ankaŭ sukcesa verkisto de pluraj, tre bonaj literaturaĵoj por infanoj, kiujn li tre amis. Esperantisto li fariĝis en la 1932. Same, kiel al Julio Baghy, ankaŭ al li Esperanto donacis flugilojn al liaj revoj. Krom preskaŭ dudeko da cenlingvaj verkoj li publikigis esperantlingve verkitajn rakontojn - "Aventuroj de Antonio", "La Alaska ŝtafeto" kaj "Kaptitoj de la glaciĝoj. La plej grandan sukceson havis "La Alaska ŝtafeto", kiu aperis krom en la ĉeĥa kaj en esperanto, ankaŭ en la germana /3x/ bulgara kaj islanda lingvoj. En preso nun estas la frislingva el- dono, kiun sekvas, verŝajne baldaŭ, la jam preta nederlandlingva tradukado. En la manuskripto estas ankoraŭ ĝis nun neeldonita verko en Esperanto

"La granda admiralo".

Edifa preleginto, gvidanto de multaj esp. kursoj, prezidanto de kelkaj kluboj kaj ĉiam instigoplana laborinto por nia movado, vera soldato, marŝinta antaŭen al certa, difinita celo. Forpasis ekstarordinare kapabla esperantisto, kiu ĉiam kredis pri la nepre venko de Internacia Lingvo. Ni kunsente prenas la parton en la doloro de liaj familianoj.

Dolfa Bartošík

La 27-an de aprilo ĉ.j. mortis samideanino Marie Hartmanová—Havránková, pensiita direktorino de meza lernejo en Luhačovice. Ŝi multe laboris por Esperanto, precipe en Prostějov.

La 6-an de majo 1960 forlasis nin samideano Josef Řebíček, 85-jaraĝa. En la kremaciejo en Olomouc adiaŭis kun li s-ano d-ro Mohapl, kiu rememoris lian diligentan kaj fervoran laboron en esp. movado.

Atingis nin malgojiĝa sciigo, ke la 15-an de julio 1960 mortis s-ano Ant. Janoušek, longjara esperantisto, kiu re- gule partoprenadis ĉiujn aranĝojn en nia Elubo.

Kun malĝojo ni sciigas vin, ke forpasis niajn vicojn samideano J. Hromada, kiu mortis la 19-an de julio. Li estis membro de nia Klubo de la jaro 1947. S-ano Jiří Hromada laboris kiel kontisto de iama ĈEA kaj multe helpis al sia patro en verkado de la vortaroj kaj en alia esp. laboro.

## JAK ŘEKNEME ESPERANTSKY "poslat dopis doporučeně"?

Nejednou se setkáváme s případy, že pisatelé používají adverbální formy participia /tj. participia s koncovkou -e/ ve funkci prostého příslovného určení způsobu, jímž se rozvíjí sloveso, a bez ohledu na to, jaký má věta podmět: "Neatendite mi ricevis gastojn". "Almetite mi sendas al vi fotografajon". "Mi sendis al vi la librojn registrite". Přitom pisatel chce říci: "Nečekaně jsem dostal hosty". "Přiložené ti posílám fotografii". "Poslal jsem ti knihy doporučeně".

Tyto obraty nejsou správné. Prosté příslov. určení způsobu musíme tvořit přímo od kmene, bez koncovky participiální: "Senatende mi ricevis gastojn!". "Alnete mi sendas al vi fotografajon", "La librojn mi sendis al vi registritaj /kiel registritaj/".

Adverbální forma participia v esperantu má funkci přechodníku /gerundio/, který sa vztahuje vždy k podmětu věty: "Neatendite venis al mi la gastoj", je správná věta: "Prišli mi hosté, nejsouce čekáni"; nebo rozvinuto do

vedlejší věty: "Přišli mi hosté, kteří nebyli čekáni"; v obou větách je tentýž podmět /hosté/, lze tedy tyto věty zkrátit přechodníkem "neatendite". Avšak "Neatendite mi ricevis gastojn" nelze rozvinout do dvou vět o stejném podmětu: "Dostal jsem hosty"/podmět/, kteří nebyli čekáni /podmět: hosté"/. Použití přechodníku je zde nesprávné.

Věta "Mi sendis al vi librojn registrite", znamená tedy "Byv zapsán, poslal jsem ti knihy". Užívá-li někdo tohoto obratu ve smyslu prostého "zapsané", "doporučeně", pravíme, že užívá "absolutního přechodníku".

Je to analogie latinského ablativu absolutního, který je však cizí duchu esperanta. Na věci nic nemění, že se s absolutním přechodníkem sporadicky setkáváme i u Zamenhova. -Pu

### DEZIRAS KORESPONDI

#### BULGARIO :

= TOSKO PANAJOTOV, Str.Nikola Dimitrov 4l Varna,14-jara lern.d.k.pri esp.kun ĉeĥoslovakaj lernantoj.

= ENĈO P. MARTINOV, Stojanovo Loveŝko, 24—jara oficisto k.kun junaj ĉeh.esp.

#### Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O :

= JAN MACURA, Starý Bohumín 308,okres Ostrava,d.k.k.int-s.PI k.s-anoj de la tuta mondo.

= MIROSLAV MOJŽÍŠKA, ulice Odboje 30, Vratimov, kol.k.int-s. alumetetikadojn kun s-anoj de la tuta mondo.

#### ĈINIO:

= YAN CHUNG KUEN, No 161 Chen Chien, Ji str.,Wuhan/Hankov/24-jara univers, stud.k.pri liter.,arto,filmo, sporto.

#### GERMANUJO:

= ERHARD W. MATTHES, Sandgewann 10, Mannheim l.d.kjkinj gejunuloj pri div. t6moj k. intersangi PM kaj Pi.

= RICHARD RALEENART, Ralhenov, Felerab- end alle 20, DDR. pri muziko k. aliaj.

#### HUNGARUJO

= TIBOR HORVÁTH, Petöfi u.71, Gyongyos, deziras interŝangi PM.

= ISTVÁN TÉRINGER, Felsrabadúlás u. 8 Pápa, 14-jara d.int-s.PM,PI,alumetetikadojn kaj aliajn objektojn.

#### JUGOSLAVIO

= KASTIC/DOBRICA, Nadruha "Napredak", Leskovac, NRC. deziras korespondi.

— MILOŠ CVEJIC, techn. 16. Februara 47 Kuršumljija, N.R.Serbija, dez. kor.

#### POLLANDO:

= MILOSLAWA SOMIEK,Ursus/K-wy, str.Sowinskiego 38, Pollando, studentino de supera muziklernejo, planistino, dez. kor. pri diversaj temoj.

= ANIĈETA RUDZKA, Michalowice k/W-wy, str.Raszynska 39, oficistino/23-jara/.

= STANISLAWA ROMASZKAS, Warszawa 38, str. Zauljk ll/13,dez.kor.pri turismo kaj interŝangi PK.

= TADEUSZ ZDZIEBKOWSKI Warszawa-Kolo, str.Obozowa 62m 23, kor.pri libroj kaj sporto.

= EVA MALISZEWSKA, Warszawa 33, str. Waszyngtona 6m5, kor. pri c.temoj, kolektas FE.

= STANISLAWA DABEK, Warszawa 32, str. Mickiewicza 27-94, kor. pri muziko.

#### SOVETUNIO:

= VIL.GOLOV Nekrasova 21 kv.17, Kujbiŝev obl.USSR, 14-jara pioniro deziras interŝ. PM k. PI kun samaĝaj geknaboj el ĉiuj landoj,

= OSKAR GARDI, Ŝkolnája 2, kv. 6, Leningrad-P 183 d.k.pri esp.-movado, historio, teorio, interŝ. BK kaj PM.

= KAIL LUVIK, Kersi str. 22,Tallin 9, 14-jara d.Interŝ.PM kaj IPK.

= TOMAS ROOTARE,Kirsi str, 7/9-2,Tallin,13-jara d. interŝ. PM kaj PK.

=B.BOGRAD,Holturinskij55,kv.6,Rostov/Don8,USSR,d.interŝ.il.gaz.k.PK,proc.k.Usono,Britujo,Japanio,Italio.

= KONOVALOV JURIJ, c/o MiroŝniĉenkoN.S..ul.Komsomolskaja 25, Zdolbunovo, Rovenskoj obl. deziras korespondi,

= VOLODJA NAJDJANOV,Ĉeljabinsk,grand-posto, SSSR,d.k.kun ĉeĥoj pri filatelio kaj ŝako.

#### S V E D I O :

= SUN LILJA, f-ino, Wenstromsvap.en 9, Stockholm No dez.kor.kun gejunuloj el ĉiuj landoj.

=JKJELL NCSDHjHasthovsga 20,Vaste- ras.glmnaziano,dez.inters.PI k.PM kun ciuj landoj,

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo en Praha ĉe Kulturcentro de ONV Praha 1, eldonas: Kulturcentro ONV 1. Respondeca redaktoro: J.M, Havlík, Plamínkové 12, Praha 7~, tel. '73637.